

*Feliĉan Novan Jaron al ĉiuj klubanoj kaj aliaj amikoj tra la mondo!***Grava anonco:**

IBIS ĉe Euston fermiĝis pro fervoja projekto HS2, tiel la alternativaj kunvenoj okazos ĉe IBIS London City (Shoreditch – apud metrostacio Aldgate East).

Kluba Programo:**januaro:**

- 5 Neniu kunveno
- 12 Novjara Festo (Dioramo)
Pro juraj kialoj ni ne rajtas postuli pagon por kovri la kostojn de la manĝaĵoj kaj trinkaĵoj. Ni tamen rajtas akcepti donacojn.
- 19 Diskuto: *Esperanto-revuoj, kiujn vi legas* (IBIS – Shoreditch)
- 26 John Wells – *Lingva Seminario* (Dioramo) (1800h: konsilantaro)

februaro:

- 2 Literatura Vespero (IBIS – Shoreditch)
- 9 Renato Corsetti – *Kulturaj Malsamecoj en Esperantujo* (Dioramo) (1800h: konsilantaro)
- 16 Literatura Vespero (IBIS – Shoreditch)
- 23 Muzikprezento de:

**marto:**

- 2 Diskuto: *Kion vi faras por informi pri Esperanto?* (IBIS – Shoreditch)
- 23 Jarkunsido



En la jaro 1987 la Nederlanda grupo "Kajto" komencis kanti Esperant-lingve.

En la somero de 1989 – dum la UK en Brajtono en Anglujo – ili eldonis la KD-on "Kajto", la unuan Esperanto-KD iam en la mondo.

Dum la jaroj kiuj sekvis, la grupo vojaĝis al multaj landoj por koncerti kaj aliaj KD-oj estis eldonitaj.

En la jaro 2004 – en la urbo Aalen en Germanujo – "Kajto" ricevis la FAME Kulturpremion kiel rekonon de la graveco de sia kontribuado al la Esperanta muzik-kulturo.

Nuntempe "Kajto" konsistas el Nanne Kalma kaj Ankie van der Meer (bildigitaj supre en Boulogne), kiuj duope vojaĝas tra la mondo por doni koncertojn kaj kant-atelierojn, ne nur en Eŭropo tamen ankaŭ en Nord-Ameriko, Aŭstralio kaj Azio. Kie ajn ili troviĝas, la programo de Ankie kaj Nanne ĉiam estas humurplena kaj taŭge adaptita al la situacio.

En 2015, dum la UK en Lille ili prezentis sian 7-an Esperantan KD-on: "Kajto flugas".

por pli da informo kaj kontakto >>> www.nanne-ankie.nl

Kajto en YouTube:

- Kajto – Kunkantado en Kopenhago: <https://www.youtube.com/watch?v=93rrzFFSo4s>
- Kajto – 'Rave kun vi' dum koncerto en Kopenhago: <https://www.youtube.com/watch?v=CusNM1HRmE0>
- Kajto – 'Mi amas vin' dum Festo 2013: <https://www.youtube.com/watch?v=dA24fA-CCTI>
- Kajto – 'Mi estas Rozo' dum koncerto en Kopenhago: https://www.youtube.com/watch?v=pS4V_hsGUV0
- Kajto – 'Lonicero' dum koncerto en Kopenhago: <https://www.youtube.com/watch?v=Xuwyz5HIHOA>
- Kajto – Koncerto en Arkones 2014: <https://www.youtube.com/watch?v=iv1KbZHnwT0>

Loko, horaro kaj aliaj informoj

Ni kunvenas vendredvespere, en iu el du lokoj:
Diorama Arts Studios, 201 Drummond Street,
NW1 3FE (por kunveno kun programo);
Ibis London City - Shoreditch Hotel, 5 Commercial St,
London E1 6BF (por babilvespero)

Kutima programo ĉe Dioramo:

18:00 lingvokurso(j) kaj/aŭ komitkunsido
19:15 - 20:15 prelego aŭ alia ĉefprogramero
20:15 - 20:45 paŭzo
20:45 - 22:00 forumo, diskuto aŭ daŭrigo de la
ĉefprogramero
22:00 fino

Dioramo: Metrostacio: Warren St (linioj "Victoria",
"Northern"), Euston Square ("Hammersmith & City",
"Circle"), Regents Park ("Bakerloo").

Fervojo London Overground: Euston

Busoj: 10, 14, 18, 24, 27, 29, 30, 73, 88, 134, 205, 390,
453, C2.

Ibis (Shoreditch): Metrostacio: Aldgate East - uzu la
eliron nro 2 (Toynbee Hall); (linioj "Hammersmith &
City", "District"); Aldgate (linioj "Circle"
"Metropolitan").

Busoj: 15, 25, 67, 115, 135, 205, 254.

Kotizoj: £10 jare; fora membro: £6 jare.

Kluba retejo: <http://www.esperanto.org.uk/lek/lek.htm>

Lokaj grupoj: Kingston: Roy Cliffe 020-8397 5895;

Orientlondono: Roy Simmons 01473-461346

rokeby@globalnet.co.uk; Sudlondono: Gregory Porilo

020-8672 8095 esperanto-sleg@tiscali.co.uk.

Federacioj: Orienta: Roy Simmons (vidu supre); Sudorienta:

Kevin Murray, 11 Leybourne Ave, West Byfleet, Surrey KT14

7HB 01932-345779 yarrump@gmail.com.



Letero de nia Prezidanto

Karaj Klubanoj:

Tiu ĉi mesaĝo estu simpla kaj rekta. Ĉar jen ĝia kerno: 2017 estis bona jaro por LEK – kaj 2018 povas esti eĉ pli bona.


Listo da sukcesoj en la pasinto jaro donas bonan impreson. Multaj lernantoj – kaj komencantoj kaj progresintoj – partoprenis klasĉambrajn lecionojn. LEKanoj allogis kaj BBC-jurnaliston kaj studento-fotografiston al siaj kunvenoj, tiel ke ĉiu revenis por esplori nian klubon kaj Movadon pli profunde. Vizitis nin diversaj spertuloj, kiuj dividis siajn vojaĝ-novaĵojn kaj verkojn kun ni. Lernis ni per novaj ludoj kaj novaj raportoj el interesaj anguloj de Esperantujo. Ni provis novajn kunvenejon, kun sukceso. Stariĝis novaj rondoj kaj serioj, precipe pri literaturo – sed ankaŭ pri aliaj temoj. Ĝuis ni belan promenadon kaj restoracian manĝon. Ni estis pli eksperimentemaj, ol kutime, kaj fakte pli viglaj, pro tio.

Nova sango, ofte juna, helpis multe en tiuj aferoj. Espereble, la nova jaro donos kelkajn ŝancojn retenigi tian sangon. Ne nur tio. La nova jaro prezentu rimedojn varbi pli da interesatoj, pli da lernantoj, pli da membroj.

Nu, ĝuste pro tio, ke tiu ĉi mesaĝo estu simpla kaj rekta, mi ne tajpu senfine. Mi lasu vin kun simpla kaj rekta peto partopreni pli ofte kaj pli intense la Londonan Esperanto-Klubon en la nova jaro. Ĉar tiel, vi sentos kaj pligrandigos ties proprajn sukcesojn kaj progresojn. Vizitu kaj vigligu LEKajn kunvenojn persone. Ne temas pri io ajn, krom plibonigo de nia komuna estonteco, ĉu ne? Jes. Jes ja.

Feliĉan Novjaron!,

David Thornell



Funkciuloj: Honora Vicprezidanto: Heleno Fantom;

Konsilantaro: David Thornell (Prezidanto kaj Sekretario), Matt Peperell (Vicprezidanto), John Wells (Vicprezidanto), Arturo Prent (Kasisto), Anica Page (Registristo), Renato Corsetti, Roland England, Stan Keable, Chris Lewis, Anna Lowenstein, Terry Page, Antony Rawlinson (Bultenisto).

Adresoj: David Thornell: lek.sekretario@gmail.com; Arturo Prent: 7 Walton Garden, Hutton, Brentwood CM13 1EJ

ap_esp-lek21@yahoo.co.uk, Terry kaj Anica Page: 7 Hampton, Gt Holm, Milton Keynes MK8 9EP terry_page@btinternet.com, anica_page@btinternet.com, Antony Rawlinson: 5 Thorpe Crescent E17 5BY acj.rawlinson@ntlworld.com.